

HORIZONTO

V-a JARO N-o 27 (3)

MAJO - JUNIO 1980

KULTURA KAJ INFORMA REVUO



Valo de la Wolmsa (Franujo)

TRADUKANTO PERFIDANTO

LA PRINCIPO DE NEŬTRALECO EN LA ESPERANTO-MOVADO

ION PRI STRASBURGO

DE LA NEŬTRALA ESPERANTO MOVADO

HORIZONTO

Direktorino
Inés Gastón

Redakta Komitato
Salvador Gumá
Juan Régulo
Jean Thierry

Red. kaj Adm.
Inés Gastón
P.º de la Constitución, 35
Telf. (976) 22.05.21
Zaragoza-1 (Hispanujo)

Eldonkvanto 1.000 ekzempleroj
Dumonata revuo
Presita en Zaragoza
ĉe "Tipografía C. Boloix"
str. Reina Fabiola, 7, Zaragoza-8

Leĝa Depono Z-133-76

N.º 3 - Majo - Junio 1980

E N H A V O

SOCIPOLITIKAJ ASPEKTOJ DE LA
ESPERANTO-MOVADO aŭ PSEŬDOS-
CIENCA... (Ivo Lapenna)

ION PRI STRASBURGO (M. M.)

BELETRO

Poemo timiga

Poemo pri la homa vorto

Sendentaj popoloj (trad. Jan Smykalski)

David kaj Bat-ŝeba (J. Kohen-Cedek)

LA PRINCIPO DE NEŬTRALECO EN LA
ESPERANTO-MOVADO (Jean Thierry)

TRADUKANTO - PERFIDANTO (Bernard
Golden)

KIO ESTAS KAJ KION CELAS N.E.M.?

VI-a INTERNACIA KONFERENCO DE
LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO

KIEL ABONI

Abonojn al «Horizonto» akceptas la ad-
ministracio: Inés Gastón, Paseo de la
Constitución, 35, Zaragoza-1, Hispanujo.
Pĝk. Zaragoza 00428398. (Jarabono por
Hispanujo kaj Portugalujo 600 ptoj., por
eksterlando 700 ptoj. aŭ 12 usonaj dola-
roj), aŭ la sekvantaj.

PERANTOJ

Aŭstrujo:

Dro. Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020
GRAZ. Pĝk. Graz 1257.845. Jarabono:
160,— S.

Britujo:

Geoffrey King, 14 Elmdale Road, LONDON
N13 4UL. Pĝk. 37.507.9106. Jarabono: 7 £.

Danlando:

Peter Zacho, Nørregardsvej 91, DK-2610
RØDOVRE, Pĝk. 628/859. Jarabono: 70,—
D Kr.

Finlando:

Finna Esperanto-Librejo, PL 221, SF-70101
KUOPIO 10, Pĝk. KU 152801-5. Jarabono:
50,— F. Mk.

Francujo:

André Bourdeaux, 91 rue de la Chapelle,
F-75018 PARIS. Pĝk. Paris 21.670.96 V.
Jarabono: 50,— Fr.

FR Germanujo:

Rudolf Helmke, Wiesenstrasse 9, D-4773
MÖHNESEE-GÜNNE. Konto-Nr. 31 377 450
Sparkasse Möhnesee (BLZ 414 514 85). Ja-
rabono: 24,— DM.

Grekujo:

Adda Sakelaropoulou, Sokratous 88 Omo-
nia, ATHENO 101. Jarabono: 380,— Grekaj
Drakmoj.

Israelo:

Ben-Alter Jehiel, P. O. B. 379, PETAH
TIKVA. Pĝk. Bank Hadoar, 4-45854-8.
Jarabono:

Jugoslavio:

D-ro Oton Pancer, Voćarsko Naselje 10,
YU-41000 ZAGREB. Jarabono: 216 n. din.

Kanado:

Kriss Smilga, 34 Martin Road. TORONTO
Ont. M4S 2V2. Jarabono: 14,— \$.

Luksemburgo:

Wickler Albert, OLM. Pĝk. 54175-49. Jara-
bono: 380 lfr.

El ĉiuj aliaj landoj oni pagu al unu el
tiuj perantoj, ĝis peranto en tiu lando
estos trovita. Personoj pretaj funkcii kiel
perantoj, bv. sin turni al la direktorino.

PLEJ GRAVAJ VERKOJ

Eldonejo: PLAZA & JANES, S. A.
ESPLUGAS DE LLOBREGAT
(Barcelona - Hispanujo)

SOCIPOLITIKAJ ASPEKTOJ DE LA ESPERANTO-MOVADO

AŬ

PSEŬDOSCIENCA PARTIPOLITIKA KONCEPTO PRI LA INTERNACIA LINGVO

(La unua parto de tiu ĉi artikolo aperis en n-ro 2/80 de *Horizonto*)

LINGVISTIKA FETIĈISMO

La prilingvajn partojn de tiu ĉi «marksisma-leninisma» libro markas kontraŭscienca fetiĉismo, laŭ kiu unuflanke troviĝas la «naturaj» lingvoj kaj aliflanke la «artefaritaj», nomataj plurloke ankaŭ «planlingvoj», ĉiam en pluralo. La esprimoj «naturaj» kaj/aŭ «artefaritaj» («planlingvoj») estas abunde uzataj en diversaj kuntekstoj, ofte nebulaj kaj konfuzaj, kun tia aplombo, kvazaŭ tiu distingo estus ĝenerale akceptita kiel senapelacia scienca vero. Tiuj eraraj kaj erarigaj terminoj aperas, ekzemple, sur p-oj 37, 166, 206, 213-214, 219, 225 ktp., ktp. D. Blanke eĉ asertas, ke «ĉiu esperantisto, malgraŭ diversideologiaj konceptoj, adaptas /adoptas?/ minimume la idealon, ke tiu /la idealo/ estu planligvo kaj ke ĝi, pro diversaj kaŭzoj, estu ĝuste la lingvo Esperanto, iniciatita de L. L. Zamenhof» (p. 182). Tio, kompreneble, estas malĝusta, ĉar amaso da esperantistoj, inkluzive minimum, ellernis kaj ekuzis la Internacian Lingvon kiel *lingvan* instrumenton de internacia komunikado longe antaŭ ol estis inventitaj la esprimoj «planlingvoj», «interlingvistiko» k.s., dum la granda plimulto, feliĉe, ankoraŭ ne infektiĝis de tiu plia malsano en la nuntempa Esperanto-Movado.

La kulminon de absurdeco en tiu tuta kontraŭscienca babilado atingas S. N. Podkaminer, por kiu Esperanto estas fakte egala al «poŝto, telegrafo, telefono, radio aŭ televido» (n. 216), do al mekanikaj rimedoj de komunikado, distinge de la «naturaj lingvoj», kiuj, do, verŝajne devus aparteni al animala aŭ vegetala mondo!

La demando pri «matureco» kaj «artefariteco» en ligo kun la Internacia Lingvo estas amplekse pritraktita en la Unua Parto de *Retoriko*, precipe en ĉap. III-VII (p-oj 60-111), en *Esperanto en Perspektivo* (p-oj 28-45), multloke en la libro *Elektitaj Paroladoj* kaj en pluraj artikoloj publikigitaj en diversaj periodaĵoj. La kunveno de la reprezentantoj de la Informaj Fakoj de UEA, okazinta en Frostavallen (Svedio) en 1956, funde ekzamenis ankaŭ tiun aspekton de poresperantaj agadoj kaj en la finaj konkludoj, formulitaj en la *Fundamenta Principaro de Informado pri la Internacia Lingvo*, listigis

la ĉefajn erarojn, inter kiuj unuavice: «(a) nomi la lingvon artefarita, helpa, verda k.s.; (b) superflue menciadi diversajn projektojn de komuna lingvo; (c) ne distingi nete inter Esperanto kiel vivanta lingvo kaj tiuj projektoj, se la cirkonstancoj devigas paroli pri ili». Siavice, tiuj principoj estas prilaboritaj en la broŝuro *Por pli Efika Informado*, eldonita de UEA en 1974, senpere antaŭ la hamburgaj eventoj.

La pritraktata libro komplete malatentas ĉion-ĉi. En la koncernaj partoj ĝi estas precize la malo de la pozitivaj rezultoj atingitaj en la kadro de la ĝishamburga CED — kaj ekster ĝi — post multjaraj lingvistikaj, socipolitikaj, psikologiaj kaj alispecaj sciencaj studoj. Ankaŭ rilate tiun principan starpunkton, same kiel rilate preskaŭ ĉiujn aliajn demandojn kaj agadojn, la nunaj «marksismaj-leninismaj» ideologoj retroiras al la periodo de la Internacio de Proleta Esperantistaro (IPE) en la tridekaj jaroj, sed kun la esence grava diferenco, ke tiam IPE kaj ĝiaj «marksismaj-leninismaj-stalinismaj» ideologoj troviĝis ekster UEA (kaj ankaŭ ekster SAT), dum la nunaj ideologoj agas en UEA kaj tiel metas plian politikan stampon sur ĝian aktualan karakteron. Interalie, D. Blanke estas komitatano de UEA kaj unu el la tri membroj de la Estraro de la nuna CED, kiu, se oni esceptas la nomon, havas nenion komunan kun la antaŭhamburga CED, likvidita fine de 1974.

Post la detala pritrakto de la afero en *Retoriko* kaj en la aliaj supre indikitaj fontoj, estas nenecese — kaj ankaŭ maleble pro la limigita spaco en *Horizonto* — reveni ĉi tie al tiu tuta multifaceta problemaro. La interesigantoj facile povas legi aŭ relegi la menciitajn verkojn. Tamen, estas utile tuŝi, almenaŭ plej koncize, la ege malbonajn sekvojn de la sciencemalakceptebla distingo inter la kvazaŭe «naturaj» lingvoj kaj la «artefaritaj», kies pluralo signifas plian sciencemalakcepteban implicitan aserton.

FUNDAMENTE ERARA KONCEPTO

Ĉu, do, ekzistas iaj «naturaj» lingvoj kaj, distinge de ili, tute alia grupo da «artefaritaj» lingvoj?

En ĉiuj seriozaj lingvosciencaj medioj la koncepto pri lingvo kiel ia natura feno-

meno — koncepto flegata precipe de la skolo de la t.n. «junaj gramatikistoj» antaŭ cent jaroj — estas delonge forĵetita ne nur en la Okcidenta mondo, sed ankaŭ en Soveta Unio. Tion mi prezentis kaj analizis jam en la unua eldono de *Retoriko*, publikigita en 1950, apogante la asertojn kaj tezojn per multnombraj citaĵoj el verkoj de konataj lingvoscienculoj, inkluzive sovetaĵn. Nun kelkajn pliajn vortojn.

Sub aŭspicio de la Lingvistika Instituto de la Akademio de Scienco de USSR en 1976 aperis en Moskvo libro sub la titolo *Problemy Interlingvistiki: Tipologija i Evolucija Mejdunarodnyh Iskustvennyh Jazykov* (Problemoj de Interlingvistiko: Tipologio kaj Evoluo de Internaciaj Artefaritaj Lingvoj), kolektiva verko sub ĉefredaktoreco de M. I. Isaev, dediĉita al «la brila memoro de E. A. Bokarev», konata soveta lingvisto kaj esperantisto. En la Antaŭparolo estas dirite:

«E. A. Bokarev devis elteni ne malmultajn disputojn pri la demando de la t.n. 'naturaj' kaj 'artefaritaj' lingvoj. Multaj scienculoj kontraŭstarigas ilin, donante avantaĝon al la 'naturaj' lingvoj. Evgenij Aleksejeviĉ rigardis tiun vidpunkton erara, ĉar, laŭ lia opinio, ĉiuj lingvoj estas 'artefaritaj', t.e. ili formiĝas en la socio kaj estas subgataj al ĝia aktiva influo. Tio precipe koncernas la literaturajn lingvojn, kiuj estas subgataj al aktiva influo fare de scienculoj kaj literaturistoj. Temas, eksplikadis E. A. Bokarev, pri LA GRADO DE ARTEFARITECO de tiu aŭ alia lingvo» (p. 9, emfazo en la originalo).

Absolute korekte. Esence la samon, cetero, diris la konata lingvisto Max Müller antaŭ pli ol cent jaroj, kaj mi mem iom detale prilaboris ankaŭ tiun aspekton en Retoriko (p-oj 73-90) kaj aliloke. Tamen — ĉiam necesas iu «tamen» en la diskutoj kun tiaj nekonsekvencaj «ideologoj» — eĉ la titolo mem, por ne paroli pri la enhavo de tiu verko dediĉita al Bokarev, per la vortoj «artefaritaj lingvoj» kontraŭdiras lian starpunkton sur p. 9, same kiel la nun ekzamenata libro kontraŭdiras ĝin.

Hodiaŭ verŝajne ne ekzistas unusola filologo aŭ sociologo, kiu ne konsentus, ke lingvo — kiu ajn lingvo, inkluzive, kompreneble la lingvon Esperanto — estas socia fenomeno, regata ne de biologiaj, sed de tute specifaj leĝoj agantaj en la homa socio.

Kvankam la penso pri lingvo kiel natura aperaĵo estas forĵetita, tamen la ideo pri la «natureco» de la lingvo reaperas eĉ nuntempe en tiu aŭ alia formo, sub tiu aŭ alia preteksto, kun tiu aŭ alia celo. Kiam en la pritraktata libro oni denove skribas pri «naturaj» kaj «artefaritaj» lingvoj (eĉ en pluralo), tiam jen plian fojon la «natureca» fetiĉo reaperas. Se la uzo de tiuj terminoj havus karakteron de ia poezia metaforo, tio ne multe ĝenus. Sed ne estas tiel. Ili estas uzataj en sia

vera senco, kvazaŭ la naciaj lingvoj, estus iaj naturaj elkreskaĵoj de nature vivanta organismo, la nacio, dum la Internacia Lingvo estus io «artefarita» en senco de kontraŭnatura, «elpensita» de unu homo kiel ekstersocia abstraktaĵo, tial sen eblecoj evolui, sen literaturo, sen poezio, sen karaktero de vivanteco... kun la fina blinkenberga rezulto, ke ĝi entute ne estas lingvo. Tiu kontraŭscienca distingo faris al la Internacia Lingvo multege da malbono, kiel ilustras du el miloj da ekzemploj tiu de Blinkenberg en Montevideo kaj tiu de Krupskaja en la tempo de Lenin.

BLINKENBERG KAJ KRUPSKAJA SAMOPINIAS

Kiel konate almenaŭ al tiuj, kiuj legis la raportojn kaj informojn ligitajn al la fina akcepto de la Rezolucio de Unesko de la 10-a de decembro 1954 favore al Esperanto, Prof. Blinkenberg lanĉis senprecedencan atakon en la Programkomisiono kun la celo malebligi la akcepton de rezolucipropono, prezentita de la meksikia delegacio. Li riproĉis, ke Esperanto estas «artefarita» kaj akcentis, ke li entute estas kontraŭ tiaj «artefaritaj», en kiuj oni eble povas «esprimi la urugvajajn menuojn», sed ne literaturajn valorojn, sciencajn pensojn, amsentojn, entute emociojn. Li diris, ke Esperanto havas mizeran aspekton, povran vortaron, primitivan sintakson, en kiu oni nenion povas diri kaj ankoraŭ malpli esprimi la grandajn sentojn de amo (v. pli detale en *Horizonto* n-ro 7/1977, p. 8). Nur dank' al grandega kontraŭagado en la urugvaj gazetaro kaj radio, kiel ankaŭ en la sino de la Konferenco mem, estis eble renversi la negativan decidon de la Programkomisiono kaj venkigi nian aferon dum la lasta plenkunsido de la Konferenco.

Nun oni sciiĝas el la priparolata libro pri la starpunkto de la edzino de Lenin al Esperanto. Jen la koncerna parto:

«La edzino de Lenin, N. K. Krupskaja, kvankam nenion skribinta pri la rilato de Lenin al Esperanto, tamen mem esprimis malfavoran opinionon pri iu artefarita lingvo ĝenerale. Laŭ ŝia vidpunkto artefarita lingvo ĉiam estos malriĉa, malviva, malvarma kaj mizera. Tamen ŝi ne neis, ke Esperanto povas esti utila por la interhomaj ligoj, sed ne povis imagi, ke juna homo diros amvortojn en Esperanto al sia amatino kaj ke patrino kantas esperantlingve lulkanton al sia infano» (p. 37).

Do, samaj falsaj konkludoj de falsaj premisoj, esprimataj per preskaŭ identaj vortoj. Ne kulpas nur Krupskaja, Blinkenberg kaj miloj da aliaj blinkenbergoj, okupantaj ofte decidajn poziciojn en la politika, kultura kaj ĝenerale socia vivo, kaj tial povantaj per tiaj falsaj «argumentoj» negative influi la publikan opinion, kelkfoje ankaŭ malrapidigi aŭ eĉ

provizore haltigi la disvastigon de Esperanto. Grandparte kulpas tiuj esperantis-
toj, inkluzive la nunajn «marksismajn-
leninismajn» ideologojn, kiuj faras la sa-
majn erarojn kaj per ili liveras municion
por la kanonoj de prejudicita kontraŭ-
uloj aŭ de apertaj, konsciaj malamiko-
j de «internacia pensmaniero», sekve ankaŭ
de Esperanto, kiaj estis kaj plu estas di-
versaj stalinoj, hitleroj, salazaroj k.s.

Se la nunaj ideologoj ne kapablas
science ekspliki la radikojn kaj esencon
de la novepoka internaciismo, al kiu es-
tas ligita la formiĝo, ekesto kaj plua evo-
luto de la Internacia Lingvo laŭ *principe*
samaj sociaj leĝoj, kiuj regas ne nur la
naciajn, sed ankaŭ la klasajn, kastajn,
religiajn kaj ĉiujn aliajn lingvojn, ili pre-
fere devus silenti por ne malutili al afero,
kiun ili verŝajne deziras progresigi. Kvan-
kam laŭ Bokarev kaj laŭ ĉiuj kompeten-
taj lingvistoj kaj sociologoj, ĉiu lingvo
estas «artefarita» en la supre difinita
senco (mi mem trovas la esprimon nea-
dekvata eĉ en tiu senco), tamen oni ne-
niam povas legi aŭ aŭdi pri «artefarita»
angla, «artefarita» rusa ktp. Estus vere
tempo, ke oni ĉesu alglui tiun epiteton
al Esperanto, precipe se oni kontraŭstar-
igas ĝin al la kvazaŭe «naturaj» lingvoj.

SCIENCE MALGUSTA KAJ TAKTIKĖ MALUTILA PLURALO

En la kadro de tiu science kaj tial an-
kaŭ taktike erara formulo, plia neallase-
bla malvero estas paroli pri «artefaritaj
lingvoj», «konstruitaj lingvoj», «planling-
voj», aŭ eĉ senepitete «internaciaj ling-
voj» k.s. en *pluralo*.

La naciaj lingvoj restas naciaj laŭ siaj
strukturo, socia portanto, intelekta pro-
prietulo kaj praktikaj aplikoj eĉ se iuj el
ili estas pli aŭ malpli vaste uzataj kiel
helpaj lingvoj en internaciaj rilatoj. Evi-
dente, pri ili tute ne temas ĉi tie, ĉar ili
tutŝimple ne estas internaciaj. Restas, do,
la *projektoj* de komuna lingvo por inter-
nacia komunikado: kvincento ĝis sescento
da ili depende de la kriterioj. laŭ kiuj oni
juĝas la «prilaboritecon» de tiuj projektoj.

Ne povas esti kia ajn dubo, ke sole la
lingvoprojekto iniciatita de Zamenhof
sukcesis transformiĝi en vivantan lingvon
de monde internacia lingva kolektivo,
uzanta ĝin por ĉiusecaj internaciaj rila-
toj praktike en ĉiuj vivosferoj. Unu el la
fundamentaj aspektoj de la evoluproce-
zoj en la naturo kaj en la socio estas la
transformiĝo (dialektika salto) de unu
kvalito en esence novan kvaliton rezulte
de daŭraj, ofte nerimarkeblaj kvantaj
ŝanĝiĝoj rilate nombron, mezuron, volu-
menon, temperaturon, ktp. depende de la
ekzamenata fenomeno. Tiun dialektikan
principon ne elpensis Marx, kvankam niaj
«marksistoj-leninistoj» devus iom scii pri
ĝi kaj, se ili estus nur marksistoj, eble
ankaŭ kompreni ĝin. Ĝi, kune kun la aliaj
dialektikaj principoj eĉ ne menciendaj ĉi

tie pro spacomanko, *objektive* konsisti-
gas la evoluprocezojn. Longe, tre longe
antaŭ Marx kaj Engels eĉ infanoj distin-
gis inter akvo, glacio kaj vapore! Kaj
ekde la lingvaj pratempoj ĉiuj sociaj gru-
poj, kiuj spertis tiun aŭ kiun ajn alian
aspekton de la realaĵo *kaj socie ekkons-
ciis pri ĝi*, kreis adekvatajn distingajn
lingvajn esprimojn, necesajn por komuni-
kado interne de la grupo. Tio, siavice, evo-
luis la penson kaj kontribuis al plua
kompletigado de la bildo pri la naturo
kaj pri la socio kun pliaj paralelaj reflek-
tiĝoj en la lingvo.

La «dialektika salto» de unu kvalito en
alian povas daŭri de unu momento ĝis
multaj dekmiloj da jaroj aŭ, rilate kel-
kajn fenomenojn, eĉ milionojn da lum-
jaroj. En la kazo de Esperanto ĝi estas
klare konstatabla kun preskaŭ naturscien-
ca precizeco. En la periodo inter 1887 kaj
1905 la kvantaj ŝanĝiĝoj — interalie rilate
la nombron de Esperanto-parolantoj, te-
ritorian etendiĝon, praktikajn aplikojn en
internacia rilatado, ĉefe skriba, kreskon
de la originala kaj traduka literaturo —
ricevis tian amplekson kaj jam tiel elvo-
luis la projekton, ke en Bulonjo-sur-
Maro konsiderinde granda *multnacia ko-
lektivo* povis ekuzi ĝin ankaŭ parole kiel
sian neŭtrale homan lingvon de internacia
komunikado. En tiu momento la projekto
fariĝis vivanta lingvo kun klare difinita
internacikaraktara socia portanto. Sam-
tempe la internaciismo — historie kondi-
ĉita de tuta aro da teknologiaj, ekono-
mikaj, ideologiaj, lingvaj kaj aliaj fakto-
roj, kaj de iliaj reciprokaj interagoj —
ricevis ankaŭ sian lingvan esprimiĝon, kio
per si mem necese fortikigis ĝin. En la
unua frazo de sia inaŭgura parolado Zame-
nhof direktis sin al «fratoj kaj frati-
noj el la granda *tuthoma familio*» kaj iom
poste emfazis «la tutan gravecon» de tiu
tago, ĉar tie, en Bulonjo-sur-Mar, «kun-
venis ne francoj kun angloj, ne rusoj kun
poloj, sed homoj kun homoj». Per tio
Zamenhof ne «kreis», sed resumis la kvin-
tesencon de la *tuthoma*, humaneca inter-
naciismo diference, ekzemple, de la origi-
nala marksisma klaskaraktara «proleta
internaciismo» kaj kontraste al la nuna
soveta «socialisma internaciismo» kiel
unu el la subigaj instrumentoj de la «pli
aĝa frato» en la rilatoj de USSR kun la
landoj de la soveta bloko. Per tio Zame-
nhof jam en 1905 ankaŭ donis anticipan
respondon al la iom infance naiva reto-
rika demando de D. Blanche en 1978 sur
p. 198 «ĉu ekzistas malhumaneca interna-
ciismo?» (pli detale pri tio en la dua el-
dono de *Hamburgo en Retrospektivo*,
p-oj 26-29 kaj aliloke).

La nova lingvo montriĝis tiel sana kaj
vivkapabla, ke ĝi povis plu ĉiurilate pro-
gresi kaj atingi la nunan stadion de inter-
na riĉeco kaj de ekstera disvastigiteco
malgraŭ la oftaj reviviĝoj de ekstremaj
naciismoj, malpermesoj, persekutoj, en-
karcerigoj kaj ekzekutadoj de esperantis-

toj, prejudicioj kaj aliaj obstakloj. Neniu el la 500-600 projektoj atingis tion. Neniu el ili transformiĝis en lingvon evolukapablan. Ili ĉiuj malaperis senpostsigne. Fakte, apenaŭ iu sciis kion ajn pri ili, se en la skribaĵo de la nunaj «interlingvistikistoj», «planlingvistoj», «senĉapeligaj reformistoj» kaj similaj istoj la nenaskitaj aŭ mortnaskitaj *projektoj* (indulgon pro la metaforo!) ne reaperus kiel principe samvaloraj al la vivanta kaj alte nuancita *lingvo* Esperanto tra la kontraŭscienca egaliga pluralo.

Estas vero, ke en noto sur p. 206 D. Blanke skribis, ke «*la nocio planlingvo en pluralo nur havas sciencaktikan signifon*», ĉar «*en la realeco nur funkcias unu planlingvo, Esperanto*».

Do, eĉ D. Blanke grandanime konsentas pri la nekontestebla vero, ke ekzistas nur unu internacia lingvo. Se tiel, do kial mensogadi per la pluralo? Kiun «sciencstrategian» celon oni fakte esperas aŭ deziras atingi per tiu kontraŭscienca «sciencaktika signifo»? Ĉu trompe allogi la lingvosciencistojn, por ke ili ekinteresiĝu pri tiuj diversaj «planlingvoj» kaj post abstraktaj kabinetaj studoj ĉiu el ili «decidu» laŭ sia gusto, ke tiu aŭ alia «plano» ne taŭgas, ellaboru novan «planon» kaj, rezulte, aperu pliaj projektoj de «planlingvoj», kiel tio jam okazis en la pasinteco? Kaj ĉu la vero, la objektiva konstato de faktoj ne estas la plej fundamenta postulato en kiu ajn scienca branĉo kiel antaŭkondiĉo de korektaj sciencaj analizoj kaj konkludoj? Aŭ, eble, la «scienco» de niaj «marksismaj-leninismaj» ideologoj estas escepto ankaŭ tiurilate?

Se la lingvosciencistoj interesiĝas pri la Internacia Lingvo, kiel ili ja devus — tiaj sendube ekzistas — ili facile povas bone ellerni ĝin kaj poste studi ĉiujn ĝiajn lingvosciencajn aspektojn, inkluzive la surprize multajn lingvajn erarojn en tiu ĉi libro kun la escepto de la artikolo de U. Lins. Se ne, do Esperanto funkciis kaj certe plu funkcios ankaŭ sen ilia interesiĝo. Ĝin povos detrui nur la esperantistoj mem. Neniu alia.

En ĉiu okazo la pluralo estas science falsa, dum la «taktiko» bazita sur tiu falsaĵo estas senlime malutila el ĉiuj vidpunktoj: ekde sciencaj pritraktoj, tra psikologiaj efikoj kaj flankefikoj ĝis praktikaj aktivadoj.

SENIDEIGO DE ESPERANTO: KIAL?

Kiel oni vidas el ĉio ĝis nun dirita, trae en la libro Esperanto estas traktata kiel simpla mekanika instrumento de komunikado, sed du artikoloj rekte celas senigi la lingvon de kia ajn idea valoro aŭ, kiel mi mem prefere esprimus min, de kia ajn socie solidariga funkcio.

En sia longa artikolo, verkita en la tempo antaŭ la likvido de kia ajn Esperanto-Movado en Soveta Unio, E. Drezén analizis la personecon de Zamenhof kaj liajn

filozofiajn, religiajn kaj prilingvajn konceptojn. Tion li faris konforme a la tiama «marksisma-leninisma-stalinisma» doktrino kaj konkludis: «*Malakceptante kaj eĉ kontraŭ-batalante la tutan politike-filozofian idearon de Zamenhof, ni devas kliniĝi antaŭ liaj lingvoideoj, kiuj unuigintaj en lia menso, estiĝis potenca forto*» (p. 161).

La artikolo de D. Blanke estas komplete dediĉita al la pritrakto de la «interna ideo de Esperanto», unue laŭ la koncepto de Zamenhof kaj poste, sub aparta titolo «La 'interna ideo' hodiaŭ» kaj aliloke, laŭ mia koncepto, fakte prilaboro kaj evoluiĝo de la Zamenhofa penso diversloke en miaj verkoj, paroladoj kaj prelegoj, kvankam mi mem neniam uzis la esprimon «interna ideo».

Blanke starigas la absurdan demandon «Ĉu lingvo enhavas ideologion?» (p. 200) por povi sur pluraj paĝoj «pruvadi» ke «identigo de lingvo kaj ideologio» (p. 201) estas erara, kvazaŭ Zamenhof, mi mem aŭ kiu ajn alia estus kiam ajn asertintaj tian stultaĵon. Tia kontraŭscienca polemikado kun vakuo, karakteriza por niaj «ideologoj» (kaj ne nur por ili), ne estas tiel naiva, kiel unuavide oni povus pensi. La skemo estas tre simpla: (i) atribui al la kontraŭuloj iun koncepton, kiel eble plej absurdan, kiun ili nek havas, nek iam havis; (ii) «pruvi, ke tiu koncepto, fakte neekzistanta, estas absurda; (iii) dedukti, ke la faktaj konceptoj de la kontraŭuloj estas «absurdaj»: en nia kazo, de la scienco korekta *koncepto* de Zamenhof, nomata iom neadekvate «interna ideo», kaj miaj analizoj pri la solidariga funkcio de lingvo estas eraraj. Tiucele Blanke misuzas la *neadekvatecon* de la esprimo «interna ideo» kaj eĉ evidentajn metaforojn — li estas sufiĉe klera por ne vidi, ke ili estas metaforoj — el miaj verkoj kaj precipe el miaj paroladoj, sed verŝajne forgesas, ke en la verkoj de Marx kaj Engels, eĉ en tia «seka» dokumento, kia estas la Komunista Manifesto (por citi nur tiujn, kies senerarecon li ne rajtas kontesti), tiaj figuroj pli ol abundas. Tamen, nek li, nek kiu ajn laŭ mia scio kiam ajn venis al ideo interpreti ilin laŭlitere, nemetafore.

Estu kiel ajn, por nia «ideologo» la enhavo de la esprimoj *tuthoma sento*, *monda pensmaniero*, *solidariga funkcio*, *universale homa konceptado*, *humaneca internaciismo*, *vivanta sento de aparteno al la homaro* (p. 198), prenitaj diversloke el miaj verkoj, estas nenio alia ol «mistikismo» (p-oj 197, 198). Malgraŭ tiu eksplacita aserto, mi inklinas dubi, ĉu eĉ por li tio estas «mistikismo», sed mi estas certa, ke por mi kaj por miloj kaj miloj da Esperanto-parolantoj ĉie tra la mondo, inkluzive la landojn de la aŭtoroj de la libro, la *tuthoma sento*, *monda pensmaniero*, *vivanta sento de aparteno al la homaro*, do humaneca internaciismo estas nenia «mistikismo», sed *idea realaĵo*. Ĝi

plu formiĝas en la sino de la monda socio (homaro) spitante la nuntempajn sporadajn reeksplozojn de ekstremaj naciismoj — parte eĉ pro ili en formo de reago — kiel idea reflektiĝo de objekte funkciantaj materiaj kondiĉoj kaj evolu-procezoj, kiuj ĉiam pli forte interdependigas kaj tial ankaŭ kunligas ĉiujn mondopartojn. Kiel almenaŭ D. Blanke el la «ideologoj» devus scii, la ideoj ne estas nur iaŭ pasivaj kaj mekanikaj reflektiĝoj de la materiaj kondiĉoj, sed siavice influas la evoluprocezojn. Nur tiu interago eksplikas la socion kaj ĉiujn sociajn fenomenojn, inkluzive la lingvon.

Esperanto ne estas «ideo». Ankoraŭ malpli «ideologio». Sed ĝi certe estas *lingva esprimo* de la novepokaj internaciismaj ideoj, ekestintaj pro la menciitaj kaŭzoj kaj kondukantaj al la estonta unueca homaro, same kiel la naciaj kaj ĉiuj aliaj lingvoj estis aŭ estas lingvaj esprimoj de aliaj materiaj kondiĉoj kaj aliaj ideoj, kondukintaj al la formiĝo de nacioj kaj aliaj sociaj kungrupiĝoj. Kaj same kiel ĉiu nacia aŭ alia lingvo efikas kunte ne kaj solidarige — ĉiu el ili en la rilato al sia socia portanto — tiel same la Internacia Lingvo efikas kunte ne kaj solidarige en la rilato al sia socia portanto, nome al tiu *monde internacia kolektivo*, kiu akceptis kaj evoluigis ĝin por sia internacia komunikado en la plej vasta senco de la vorto. Plue, same kiel ĉiu nacia, etna aŭ alia lingvo fortikigas la senton pri aparteno al la koncernaĵo nacio, etno aŭ alia socia unuo, tiel same la Internacia Lingvo fortikigas la senton pri aparteno al la homaro. Mi povus daŭrigi per pliaj «same kiel... tiel same», sed espereble tio sufiĉas. Se ne estus tiel, la lingva problemo ne ekzistus kaj ankaŭ Esperanto neniam estus ekestinta.

Tio — nek pli, sed ankaŭ ne malpli — estas la kvintesenco de la «interna ideo», kiun mi prefere nomas solidariga rolo de la lingvo, ĉar lingvo *interne* de si ne havas ideon, sed certe en sia funkcio de lingvo servas ne sole por pensado kaj komunikado, sed ankaŭ efikas «ekstere», solidarige.

Krome, se la Internacia Lingvo ne efikas tuthome solidarige, la malpermesoj de Esperanto, la malebligadoj de liberaj

internaciaj kontaktoj pere de ĝi kaj la persekutadoj de esperantistoj en la ekstreme naciismaj totalecaj sistemoj neniam estus okazintaj. Kaj ankaŭ la antaŭaj kaj nunaj «ideologoj» ne devus malŝparadi tiom da tempo kaj papero por provi konvinki la politikajn decidajn faktorojn en siaj landoj, ke Esperanto ne havas pli da socia signifo, ol posedas — telegrafo, alivorte, ke ĝi ne estas la «dangera lingvo» povanta, eble, minaci eĉ detaleton de la senerara totaleca ideologio, sur kiu baziĝas la soveta regadsistemo, precipe la dogmon pri la «proleta» internaciismo laŭ la *soveta* misinterpreto de tiu esprimo.

Drezen provis senigi la Internacian Lingvon ĝuste de tiu *tuthoma* solidariga rolo por plaĉi al la tiamaj mastroj. D. Blanke faras la samon por plaĉi al la nunaj. En ambaŭ kazoj temas verŝajne pri sincera kredo, ke tia «senideigita» Esperanto estos pli facile akceptebla por la reganta tavolo («scientaktika» movo?). Drezen ne sukcesis kaj estis ekzekutita. Multaj aliaj same. Se Blanke kaj liaj amikoj sukcesos eĉ per tia «taktiko», science falsa, ne nur utiligi la lingvon por partipolitikaj celoj, kiel ili nun faras, sed ankaŭ amase disvastigi Esperanton en siaj landoj, precipe en la ŝlosila USSR, por libera translima komunikado pere de ĝi, ili havos la okazon mem konstati la efikon de la tuthome solidariga rolo de Esperanto. Eble eĉ la reĝimo fariĝos malpli ekskluziva kaj la dogmo pli elasta. Se ne, la ekskluziveco de la sistemo ekskludos la Internacian Lingvon. Plian fojon provizore. Kiu vivos, vidos.

* * *

En Strasburgo, dum la 6-a Internacia Konferenco de N.E.M., mi iom pli detale pritraktos en la inaŭgura prelego la tutan demandon. D. Blanke kaj liaj kunlaborantoj estos bonvenaj, se ili povos ricevi elirvizojn por ĉeesti kaj partopreni la diskuton. Tie, en demokrata atmosfero, ili povos libere esprimi siajn opiniojn kaj defendi siajn starpunktojn. Kaj ankaŭ iom al kutimiĝi al aŭskultado — kaj aŭdado — de alies opinioj kaj starpunktoj, se tio entute ankoraŭ eblas.

Ivo Lapenna

DONACIOJ POR «HORIZONTO» 1980

<i>Gisnuna sumo</i>	10.783	ptoj.
Gösta Persson, Helsingborg (Svedujo) .	1.500	»
Astura donanto (Hispanujo)	100	»
Antonia Lapuerta, Zaragoza (Hispanujo)	100	»
Jaime Perarnau, Tarrasa (Hispanujo) .	900	»
Victor Ortiz, Zaragoza (Hispanujo) . . .	400	»
Suitbert Siedl, Salzburg-Aigen (Aŭstrujo)	220	»
Félix Primetzhofner, Aspach (Aŭstrujo) .	220	»
Gertrud A. Tomasek, Wien	220	»
Leopoldine Heilinger, Leoben (Aŭstrujo)	220	»

Hans Bürger, Linz (Aŭstrujo)	110	»
Gottfried Hofstätter, Steyr (Aŭstrujo) .	110	»
Karl Beckmann, Wien	110	»
Georg Loczi, Markt Hartmannsdorf (Aŭstrujo)	110	»
Hans Zeller, Steyr (Aŭstrujo)	110	»
Martin Michelitsch, Thalgau (Aŭstrujo)	552	»
Klaus Perko, Graz (Aŭstrujo)	5.524	»
Manuel Sosvilla, Sta. Cruz de la Palma (Hispanujo)	1.400	»
	22.689	»

ION PRI STRASBURGO

ARGENTORATUM estis la unua kaj romia nomo de Strasburgo: ĝi reflektis la arĝentohelajn ondojn de la riveroj ILL kaj BRUCHE (Bruŝ), malnova paradizo de la keltaj fiŝistoj (15-a antaŭ J.K.).

La soldatoj de Romo estos forpelitaj, kvar jarcentojn poste, de la ĝermanaj triboj kiu donos al la «urbo de la stratoj» jus konkerita, la nomon de «STRATEBURGUM».

Pro sia situo, Strasburgo estis ĉiam la celtabulo kaj la trairejo de ĉiuj invadoj el trans-Rejno kaj estis oftege detruita, bruligita, elrabita kaj rekonstruita. Unu solan fojon dum ĝia historio, oni elektis ĝin kiel ejon de pacigo: tiu estis kiam en la jaro 842-a, per la «Juro de Strasburgo», du el la filoj de Louis le Débonnaire (Ludoviko la Trotolerema) ĵuris fidelecon unu al la alia. Tiu ĵuro estas fama, ĉar ĝi estas la unua oficiala teksto konata en la du lingvoj romana kaj ĝermana.

De la 842-a ĝis la Renesanco, la urbo grandiĝas, modeliĝas kaj firmiĝas pere de la fiera kaj ununura pinta turo (1439-a) de sia katedralo kies konstruado komenciĝis kvar jarcentojn pli frue.

Se Alzaco jam estiĝis franca per la «Kontrakto de Vestfalia» en la jaro 1648-a, ĝia ĉefurbo sin donis nur en la jaro 1681-a al la reĝo Ludoviko la XIV-a. Ĝi tiam gajnas novajn arĥitekturajn trezorojn, la noblan ideon de la Franca Revolucio kaj sennuban prosperon.

Malgraŭ la doloroj de la militoj kaj la neevitebla evoluo de la moderna mondo, la saĝo de la Eŭropa Urbo rememorigas la juĝon kiun ERASMO esprimis en la jaro 1514-a: «Mi vidis en Strasburgo monarkion sen tiraneco, aristokration sen ribela partio, demokration sen tumulto, riĉecon sen lukso, prosperon sen parademo...».

En la jaro 1434-a, GUTENBERG fuĝis el Majenco kaj venis al Strasburgo kie li kreis kun tri Alzacanoj asocion por pripensi la diversajn «sekretajn sistemojn» kiuj kondukis al la kreo de presmaŝino kies elpenso renversis la mondon.

La militoj kaŭzitaj pro la REFORMACIO dispartigas Alzacan en du kampojn. La urbestro de Strasburgo havas la ideon organizi, en la jaro 1576-a, allogan manifestacion kiu devas malstreĉi la ekscititajn mensojn: temas pri granda pafkonkurso. Ĉiuj Alzacanoj estas invitatitaj sed ankaŭ la najbaroj el Svabujo, el Bavarujo kaj el la liberaj urboj de Svisujo. La konkursloko estas tiu de la nuna parko de Contades. La Zurikanoj estas la venkantoj. Por festi tiun venkon, kvardek ok burĝoj el Zuriko decidis renkonti la venkintojn en Strasburgo. Estas longa vojaĝo per ŝipo laŭlonge de la Linmat, la Aar, kaj la Rejno. Ili provas fari tion kion oni nuntempe nomus rekordo: ili devas remi sufiĉe rapide por ke grandega kuirpoto kun bolanta milio ĉirkaŭata de varma sablo kaj lokita en la centro de la boato, estu ankoraŭ varmeta je la alveno. Tiu bravegaĵo estas efektivigita post deksep horoj. «Se iam vi estos en danĝero», diras la ĉefo de la Svisoj ĉe la granda bankedo kiu kronas la feston, «vi scios ke estas eble al ni flugi al via helpo en malpli da tempo ol bezonas milia kaĉo por malvarmiĝi».

Tri jarcentojn poste, en la jaro 1870-a, lojalaj posteuloj de la burĝoj de Zuriko alportas sian helpon al Strasburgo bombardita, plenumante tiel la promeson faritan de iliaj prapatroj la tagon de la Granda Pafo!

Tiun rakonton oni povas legi ankoraŭ nun sur la fonto staranta sur la Placo de Zurich, en Strasburgo.

Alia evento: en la jaro 1770-a, la studento GOETHE venis al la Universitato de Strasburgo kie li studis juron. Kune kun siaj amikoj li havis ĝojan vivon kaj ne malŝatis la alzacan vinon! Ĉiu konas ankaŭ lian idilion kun Frédérique Brion, la filino de la pastoro de Sessenheim. Post sia doktoriĝo, li forlasis Strasburgon por reveni al Frankfurto. En siaj «Memoroj», li menciis tiujn feliĉegajn jarojn en Alzaco.

Ankoraŭ iomete da historio: se vi promenas laŭlonge del la rivero ILL, vi vidos apud la ponto de la korvo (Pont du Corbeau) malnovan domon, la iaman tielnomatan «Hotelo de la Korvo»; oni nepre eniru la korton, kiu estas vere vidinda. Famaj gastoj loĝis en tiu hotelo: En 1520-a, franca ambasadoro; en 1570-a, Jakobo, duko de Zweibrücken kaj Bitĉ; en 1573-a, Duko de Bavario; en 1622-a, la sveda generalo Gustav Horn; en 1634-a, la sveda kanceliero Oksentirn; en 1647-a, la marŝalo Turenne; en 1650-a, la Princo (elektinto) de Heidelberg kun sia edzino; en 1659-a, la Princoj Ferdinando kaj Leopoldo de Baden; en 1669-a Johano Kasimir, la reĝo de Pollando; en 1740-a, Frederiko la Granda, reĝo de Prusio, kiu venis inkognite sub la nomo de Grafo Dutour; en

HEINRICH MÜLLER

24.11.1901 - 15.4.1980

Kun granda emocio ni konis la malĝojigan novaĵon:

S-ro Heinrich Müller mortis!!!

Kvankam ni jam estis informitaj pri lia grava malsano, tiu doloriga sciigo lasis en ni, senton de granda malpleno. La Neŭtrala Esperanto-Movado perdis unu el siaj plej sindonaj membroj. — Estis tiel profunda mia bedaŭro kiam mi konis tiun sciigon, ke mi, preskaŭ ne sukcesis esprimi mian senton pere de vortoj. Sed nun, mi deziras elmontri mian respekton kaj dankon al li, en la paĝoj de «Horizonto», kiel postmortan omaĝon.

S-ro Müller estis personigo de simpatio kaj afableco. — Mi konis lin en Parizo dum la II-a Internacia Konferenco de N.E.M., kiam en malfacila momento, li konsentis esti peranto de la revuo por Germanujo. Li apartenis al tiuj esperantistoj, kiuj bone konantaj la internacian lingvon, ankaŭ sentis la esperantismon kiu donis al ĝi animon kiel vivanta lingvo, kaj sciis elmontri ĝian praktikan flankon pere de serioza laboro. — Li estis brila ekzemplo de modesteco kaj sindonemo.

Li pasis tra la vivo bonfarante kaj nun li sekvis la vojon al la eterna ripozo.

Pacon al li!

Por lia vidvino nian plej sinceran kondolencon.

La 10-an de majo forpasis en Valladolid (Hispanujo) nia samideano,

JUAN M. PIQUERO

Kun amiko Juan Piquero, malaperas el niaj vicoj unu el la plej noblaj kaj sindonaj homoj de la Esperanto-movado. — Li, logita de la ideo pri internacia lingvo, ĉiam sciis harmonii la devojn de sia profesio, kun la disvastigado de Esperanto, kaj ties interna ideo. Lia forpaso profunde kortuŝos al ĉiuj esperantistoj konantaj lin, kiuj scias ke ili perdis amikon, kiu dum sia vivo estis bona por ĉiuj.

Ni dediĉu al li penson de amo, por juste lin reciproki je la alveno en la Finon de la virta irado.

Li pace ripozu!

Por lia familio nian plej sinceran kondolencon.

1777-a, Josefo II-a, kiu kvankam germana imperiestro, vojaĝis inkognite sub la nomo de Grafo de Falkenstein.

Se nuntempe oni vidas tiun malnovan, malriĉan domon, oni vere ne povas kredi ke tiom multe da famaj homoj loĝis en ĝi.

Dum nia VI-a Internacia Konferenco de N.E.M., ni vizitos kune la malnovajn historiciajn kvartalojn. La plej malnova kvartalo estas nomita «La Petite France» («Malgranda Francujo»); tie vi povos admiri la restoracion «La Maison des Tanneurs» (la tanista domo) kie, dum multaj jaroj, la Esperanto-Grupo de Strasburgo kunvenis regule ĉiun merkredon.

Do, ĝis revido en Strasburgo!

M. M.

BELETRO

STANISLAW JERZY LEC /1909-1966/ eminenta pola poeto kaj satiristo; majstro de skeptika aforismo. Lia specifa filozofio de paradokso, lapidare esprimita skeptika moraleco, super kiuj tamen ĉiam regas bono kaj justeco, starigas lin en la vico de eminentaj polaj poetoj.

POEMO TIMIGA

Amikoj miaj pereadis
kun supren levita kapo
kio estis tre malfacila
dum pafo en okcipiton.
Tia estis akordo
unuflanka
inter ni
sen konsento de l' malamiko.
Mi tiun akordon rompis
kaj eskapis
el ekzekutejo
mi volis la heroecon
produktivigi.
Por ke ĝi donu fruktojn
kiuj fermentante
trinkigu nin
per narkotiganta
espero.
Kaj eble
mi agis senkonscie
intence avantaĝe
al malamiko
por savi lin kontraŭ
plenumo
de ankoraŭ unu
krimo?

POEMO PRI LA HOMA VORTO

Balanciĝas la homo
sur la tempopendolo
kiel araneo, alkrōĉita
al propra salivo
en kiun la vorto
ŝanĝiĝas.
Li povas sur ĝi
malproksimiĝadi de si
povas proksimiĝadi
rompiĝos araneaĵo
balanciĝas la homo
sur la fadeno
de la homa vido
ĝis kiam ne kaptos lin
la vorto
por enterigi.
Li mortis en vorto
forstrekita el la nomaro
ne elparolita laŭtvoĉe.
Prisilentita.
La vorto en li
ne mortu.

SENDENTAJ POPOLOJ

Sendentaj estas
popoloj
kiuj dentklakis
jarcenton.
Lango ilia malakra.
Iufoje al ili
la vorto
nesingardeme elfalas
ne haltigita
per
dentokunpremo.

el la pola tradukis:
Jan Smykalski (Wroclaw)

DAVID KAJ BAT-ŜEBA

*«...Okazis, ke vespere David leviĝis de sia kuŝejo kaj ekpromenis sur tegmento de la reĝa domo; kaj li ekvidis de la tegmento virinon, kiu sin lavis; kaj la virino estis tre belaspekta... Kaj oni diris al li, ke ŝi estas Bat-Ŝeba... edzino de Urija... Tiam David sendis senditojn por preni ŝin...»
(II-a de Samuelo; XI, 2-5.)*

Kaj aŭdis reĝo Davido
en sia hela ĉielo:
liberas de juga egido
la regno de Israelo.

Okupis la reĝon memoro
pri la pasinta tervivo,
pri amoj, militoj kaj gloro,
urbfonda, konstrua aktivo.

Obsedis lin nostalgie
Dezir' ĝis dolora konsterno,
ekvidi denove, magie,
la urbon de glora eterno.

Piede, en kora sopiro
forlasis li Edenon
por pena teren-subiro,
ekvidi Jerusalemon.

Siriĝis rimen' de sandaloj
al reĝ', dum laciga pilgrimo;
sur vojoj trans montoj, trans valoj
doloris la korp' kaj l' animo.

De dornoj kaj de skorpio
vundiĝis piedoj ĝis sango.
Sed ne pro laco, aŭ pio
ekbrulis la larmoj sur vango.

Sur alta monto Oliva
frapad' oftigis enkora;
Dum suna subir', l' urb' dekliva
aperis en luma bril' ora.

La or' de moskea kupolo
rebrilis en vitroj Cionaj,
kaj volvis sankt-aŭreolo
pordegon de «Idoj Leonaj».

Ĉirkaŭis la reĝ' kastelon,
Urb-muron, — en brilo de kupro;
en «Davidan Citadelon»
envenis, ĝis pinta tur-supro.

Rigardis li ne al la urba
novstila parto, moderna,
nur al l' antikva, strat-kurba, —
la Sankta Urbo, eterna.

Tegmenton serĉis li pleban
kaj platan, sur kiu li foje
rimarkis la nudan Bat-Ŝeba'n,
amitan en peko, malĝoje.

Al reĝo ŝi cedis kun amo
aroma pli ol anizo,
trinkigis ŝi lin per balzamo
de tera amor-paradizo.

Pasia amora magio
kroniĝis per ĝem' kaj singulto, —
dolora final' de orgio,
pro peko de la adulto...

Ekserĉis la reĝ' denove
tegmenton ŝian, la platan,
esperis ekvidi retrove
virinon eterne amatan.

Poveble okazos miraklo,
miraĝo, aŭ iluzio,
kaj reripetiĝos spektaklo;
revivos ŝi en la vizio...

Sed Sanktan la Urbon detruis
multfoje, multfoje barbaroj;
aliaj dum temp' ĝin konstruis
kun ne rekoneblaj riparoj.

Kaj vagas la reĝaj okuloj
en serĉa rigardo ŝveba,
dum koro tra larmaj nebuloj
krivokas: — «Bat-Ŝeba, Bat-Ŝeba!»

Sin serĉis la reĝ' en interna
longdaŭra aspiro, korstreba,
Ĝis malesperiĝo konsterna:
ne estas trovebla Bat-Ŝeba!

En Jerusalemo antikva
abundas aro tegmenta;
kun tiu ĉi, plata, oblikva,
nenia sed, estas identa.

Kaj multas la urb-loĝantaro,
virina, vira kaj beba;
neniu sed, laŭ komparo,
similas al lia Bat-Ŝeba.

Subiris la reĝo de l' turo
reveni al firmamento;
ne restis por kora torturo
konsolo de morna turmento.

Kaj flustris la lipoj de reĝo:
—«Se eblus pasinton reveko,
volonte mi pentus kun peĝo
post rea adulta peko!...»

J. Kohen-Cedek
(Jerusalemo)

"TRADUKANTO-PERFIDANTO"

Kelkaj rimarkoj pri la arto fuŝtraduki

Bernard Golden.

Mi esperas, ke mi ĝuste tradukis la italan esprimon *traduttore - traditore*, kiu titolas tiun ĉi eseeton. En *Horizonto* (1979/4, p. 73-77) Prof. Waringhien enkondukas sian interesvekan artikolon pri la tradukarto per ekzemploj de erare tradukitaj vortoj kaj esprimoj. Ankaŭ mi, kvazaŭ hobia, kolektas erarojn, kiujn mi trovas en Esperantaj tekstoj. Kelkaj estas amuzaj kaj donas okazon rideti aŭ eĉ ridi, dum aliaj estas tiel enigmaj, ke nur helpe de la originala etnolingva teksto estas eble scii, pri kio temas. La tria kategorio de tradukeraroj estas la plej grava, ĉar ili povas okazigi miskomprenon de la enhavo.

La sekvaj ekzemploj de eraroj ĉerpitaj el n-roj 2 kaj 3 de la prestiĝa publikigaĵo *Esperantologiaj Kajeroj*, ilustras ĉiujn specojn. Troviĝas kelkaj misaĵoj, kiuj falas al ĉiu en la okulojn, kaj aliaj, kiuj estas deĉifreblaj nur, se oni scias la hungaran lingvon. Tiuj malĝustaj tradukoj ja meritas specialan atenton, ĉar ili venas el la plumoj de universitataj studentoj, kies fako estas la lingvistiko. Tikla demando estas: kial ne estis elsarkitaj tiuj eraroj dum la legado de manuskriptoj, neta taŭbado kaj korektado de presprovaĵoj? Estas apenaŭ kredeble, ke la Filologiscienca Fakultato de la Universitato Loránd Eötvös en Budapeŝto, kiu eldonas *Esperantologiaj Kajeroj*, permesus tian lingvan malzorgon en siaj hungarlingvaj publikigaĵoj.

1. «...se mi lernas anstataŭ la voĉvico: *atya* la voĉvicon: *Vater* aŭ *père*, ĝustadire mi lernis nenion novan...»

En la hungara originalo, la termino *hangcsoport*, «songrupo», estas uzata antaŭ la etnolingvaj vortoj signifantaj «patro». «Voĉvico» evidente estas erara traduko pro la uzo de «voĉ-» kaj «vic-». Ne estas klarigebla la uzo de «vic-» anstataŭ «grup-», sed la intermiksiĝo de «voĉ-» kaj «son-» estas tre karakteriza trajto de la hungara dialekto de Esperanto. En la hungara lingvo, unu vorto, *hang*, havas ambaŭ signifojn, kaj hungarparolantoj tre ofte diras «voĉo», kiam en la kunteksto «sono» estas la ĝusta vorto.

2. «...kiu volas ja krei artefaritan profundan strukturon, devus trakonstrui la tutan kognitivan sistemon de la homaro.»

Estas certe, ke en la originala hungara teksto aperas la verbo *átépit*, kiun la fuŝtradukinto esperantigis kiel «trakonstrui». Sed la signifo tute ne estas «konstrui de komenca ĝis fina loko, momento aŭ grado, laŭ la difino en *Plena Ilustrita Vortaro* (PIV) de la prepozicio «tra-» uzata prefikse. La prefikso *át-* en la hungara signifas, sed la «tra», «trans», «super» kaj «dum», ankaŭ «re-» aŭ «denove». Sekve, *átépit* devas esti tradukita per la vorto «rekonstrui», kaj tiel tradukas ĝin la hungara-Esperanta vortaro de Pechan. La polisemia naturo de *át-* daŭre misgvidas hungarlandajn esperantistojn, kaj ili ofte elektas la malĝustan ekvivalenton en Esperanto.

3. «Géza Bárczi recenzis la unuan universitatan lernolibron...»

Oni recenzas libron *post* ties publikigo, kaj la hungara verbo estas *ismertet*. Laŭ la hungara teksto, Prof. Bárczi *birálta a tankönyvet*, t.e. laŭ peto de la eldonejo, li legis la manuskripton de la lernolibro antaŭ publikigo por doni sian opinion pri ĝi laŭ faka vidpunkto. *Birál*, do, signifas «kritike juĝi». Recenzo kutime estas publikigita en periodaĵo, dum la *birálat* aŭ faka prijuĝo, estas verkita en la formo de raporto al la eldonejo.

4. En n-ro 3 de *Esperantologiaj Kajeroj* estas represita la «Primorta Prediko» pri Géza Bárczi, kiu mortis en 1975. Tiu stranga esprimo odoras je traduko de la hungara *halotti beszéd*. En Esperanto oni kutime diras «funebra parolado».

5. «...la turisto, la vojaĝanto impulsite de la spert- kaj scisopiro trairas la forterajn landojn de la fremdaj popoloj.»

En la originalo «forterajn landojn» estas *messzeföldi országait*. En la ĉiutaga Esperanto oni diras «malproksimaj landoj», aŭ se oni volas havi pli poezian esprimon, «lontanaj landoj».

6. «...interpretisto ne konvenas por rapida, scienca opiniŝanĝo...»

Véleménycsere signifas, ne «ŝanĝo de opinioj», sed «interŝanĝo de opinioj». Tion faras multaj homoj ĉe kongreso, kvankam eble kelkaj ankaŭ ŝanĝas siajn opiniojn.

7. «...samtempe ĉesus la fuŝado en la fremdaj lingvoj, kiu eterne infektas la nacian lingvon per la plej diversaj barbarajoj...»

La vorto *barbarizmusok* en la originala teksto devas esti tradukita per «barbarismoj» en Esperanto, ĉar temas pri lingvaj eraroj. «Barbarajoj» en Esperanto kaj en la hungara estas tute alia afero: *barbárság, kegyetlenség*.

8. «La granda plimulto kiu ne ricevis specialan lingvokapablon de la sorto, vane disipas tempon kaj lacon...»

«Disipi lacon» estas sensencaĵo. En la hungara teksto la vortoj estas «*hiába pazarolna idôt és fáradtság*» signifanta «vane disipus tempon kaj fortostreĉon». La tradukinto, kiu estas eksterlanda studento, kies gepatra lingvo ne estas la hungara, konfuzis la vorton *fáradtság*, «penado, klopodo», kun *fáradtság*, «laceco»!

9. «De ĉi tie devenas la primato de la sinkronismo ene de la struktura lingvistiko.»

La kompatinda leganto, trovante la vorton «primato» en tiu ĉi frazo, gratos al si la kapon, ĉar nenio en la kunteksto de la artikolo temanta pri la lingvistiko, rilatas al «mamulo havanta nur ok incizivojn kaj antaŭenrigardantajn okulojn» (PIV). La tradukinto tutsimple esperantigis la hungaran latindevenan vorton *primátus*, kiu signifas «antaŭeco, unuaeco, supereco, hegemonio». Sed tiujn signifojn la samdevena Esperanta vorto ne havas.

10. *Esperantologiaj Kajeroj* — 3 estas dedicitaj al la eminenta hungara lingvisto Géza Bárcki (1894-1975), kiu estis ankaŭ esperantisto. Antaŭ la unua mondmilito li estis kunlaboranto de la revuo *La Verda Standardo*. Li verkis kelkajn librorecenzojn pri verkoj, kiuj hodiaŭ plejparte estas forgesitaj eroj de la literatura historio de Esperanto. Tamen, unu recenzo kaptis mian atenton, ĉar mi legis ankaŭ ĝian enhungarigon.

En 1912 estis eldonita en Vieno *La Verda Kakatuo*, unuakta groteskaĵo de la aŭstria teatraĵverkisto Arturo Schnitzler, tradukita de Joh. Schröder. La titolo en la hungara lingvo aperas kiel *A Zöld Kaktusz*. Retradukante ĝin en Esperanton oni ricevas novan titolon, *La Verda Kaktó!* Jen mirakla transformiĝo de birdo en planton! La povra tradukinto, ne sciante la signifon de la Esperanta vorto «kakatuo», kiu ja estas internacia*, tradukis ĝin per la hungara vorto *kaktusz*, «kaktó». Sed jam en 1909 pli lerta hungara tradukisto elgermanigis la originalan titolon, *Der Grüne Kakadu*, kiel *A Zöld Kakadu*, t.e. *La Verda Kakatuo*.

Kion opinius la aŭtoro, Arturo Schnitzler, pri tiu fuŝtraduko de la titolo de sia verko? Cu li sakrus aŭ ridus? Kaj kiel reagus Géza Bárcki, la universitata profesoro? Mi konjektas, ke li ĝemus unu — du fojojn kaj elbuŝigus la italan diraĵon «*traduttore - traditore!*».

* A. cockatoo; F. cacatoès, cacatois; G. Kakadu, His. cacatúa; Ned. kaketoë; Por. cacatua; R. kakadu.

Lastmomente

INTERNACIA ESPERANTO-ASOCIO DE JURISTOJ KUNVENOS EN STRASBURGO

Laŭ la ĵusa decido de la Plenuma Komitato de Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj (IEAJ), la jara kunveno de la Asocio okazos dum la 6-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado en Strasburgo de la 26-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto 1980. La precizaj dato kaj horo de la kunveno troviĝas en la programo de la Konferenco, kiun ĝustatempe ricevos ĉiuj konferencanoj.

La kunveno de IEAJ pritraktos ampleksan tagordon, interalie la Raporton pri la agadoj de la Asocio en 1979/80, la finanĉan raporton, buĝeton por 1981, enhavon de *Internacia Jura Revuo*, laborplanon por la sekvanta jaro kaj aliajn demandojn laŭ la Statuto. Tiu ĉi kunveno estas aparte grava, ĉar Prof. Dro I. Lapenna, la fondinto kaj prezidanto de IEAJ ekde 1957, nuntempe ankaŭ redaktoro de *IJR*, definitive decidiĝis ne plu akcepti kandidatigon al prezidanteco kaj redaktoreco. La kunveno elektos ne nur novajn prezidanton kaj redaktoron, sed ankaŭ la aliajn membrojn de la Plenuma Komitato.

Antaŭ la kunveno Prof. Lapenna skizos en mallonga prelego la historion de IEAJ, ĝiajn ĉefajn atingojn ekde 1957, ĝian rolon por evoluigo de la esperantlingva jura terminaro kaj ĝiajn aktualajn taskojn. Li koncize prezentos ankaŭ la laboron de Internacia Societo de Juristoj Esperantistoj, kiu estis fondita en 1906 de advokato A. Michaux, la fama organizinto de la Bulonja UK en 1905, sed en la 30aj jaroj ĉesis funkcii ĉefe pro la batoj, kiujn nazia Germanio donis al Esperanto.

Oni atendas, ke multaj membroj partoprenos la kunvenon, des pli ke ĝi estos la lasta sub la prezidanteco de la nuna prezidanto.

Juristoj, kiuj parolas la Internacian Lingvon, povas fariĝi ordinaraj membroj de IEAJ; esperantistoj, kiuj studas juron, aŭ kiuj laboras kiel oficistoj en kiu ajn jura institucio, povas fariĝi eksterordinaraj membroj; aliaj povas fariĝi abonantoj de *IJR*. La kotizo, resp. abono por ĉiuj estas 120 aŭstria ŝilingoj aŭ agalvaloro jare. *La pagojn akceptas la sekretario-kasisto Dro Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020 Graz, Aŭstrio, poŝta ĉekkonto n-ro 1257.845.*

Por aliĝo kaj por ĉiuj informoj *rilate la KONFERENCON* oni bv. sin turni al S-ino M. Muller, 80, Bd. Clemenceau, F-67000 Strasbourg, Francio, prezidantino de la Loka Organiza Komitato.

(el prelego de Jean Thierry en la IV-a Internacia Konferenco de NEM en Jaca 1978)

De 1947 ĝis 1974 neniam venis en la kapo al iu ajn samideano eĉ nur la impulso ri-proĉi la 4-an artikolon de la UEA-statuto, kiu proklamas la respekton al la Homaj Rajtoj kiel esencan kondiĉon de ĝia laboro... Nur en 1979 ekestis legeblaj en ESPERANTO-REVUO (oficiala organo de UEA) kritikoj kontraŭ la mencio de la Homaj Rajtoj en la statuto!

I — *HISTORIA TRARIGARDO* — Ankaŭ en rilato al la neŭtraleco la historio de la movado ĝis 1974 prezentas kvar periodojn.

1.^o 1887-1897, *la dekjara slavgermana periodo de la komenco*. En tiu tempo stariĝis eĉ ne ia demando pri neŭtraleco: la pioniroj pli okupiĝis pri la lingvo mem kaj la lingvaj reformo-proponoj. La sam-ide-anoj estas poeziemaj idealistoj, kies versoj prikantas precipe temojn kun pacifismaj kaj eĉ religiaj trajtoj. Jen ekzemple kelkaj versoj de A. Dombrowski el poemo titolita «NOVA KANTO»:

*Por ke venu tiu horo —
Kune fratoj, al laboro!
Jen per kanto, jen per vorto,
Jen agante ĝis la morto,
Servu ni al la afero,
La plej bela sur la tero,
Gardu ĝin de la forgeso
Per parolo en la preso;*

*Iru kiel apostoloj
Ĝin prediki por popoloj,
Kaj eksonu nia voko
Sur la ter' en ĉiu loko,
En vilaĝoj, en urbetoj,
En lernejoj, en gazetoj,
Kaj servantaĵn al la vero
Nin fortigu la Espero.*

La elekto de la verda koloro kaj de la kvinpinta stelo datiĝas ja de 1895...

2.^o 1897-1917, *la dudekjara franca periodo ĝis la morto de d-ro L. L. Zamenhof*. Ĝin karakterizas la batalo inter de Beaufront unuflanke kaj la triopo Hippolyte Sebert, Carlo Bourlet kaj Théophile Cart aliflanke. Jam de januaro 1898 la raciisto de Beaufront fondas sian Societon por la Propagando de Esperanto (verŝajne laŭ imito de la Societo por la Propagando de la Fremdaj Lingvoj, kies ekzisto en Francio ankoraŭ nun daŭras) kaj helpe de dulingva gazeto «L'Espérantiste» li senĉese strebas por trovi politikajn «apogantojn» en la altaj instancoj kaj medioj; tial, ĝuste por ne timigi eventualajn apogantojn li deziras senigi la lingvon je ĉia mistiko kaj sento, kaj li baldaŭ kolizios kontraŭ la idealoj de d-ro L. L. Zamenhof mem. Pri la samaj celoj siaflanke konkuras la triopo; sed por kontraŭi la monopoleon rolon de Beaufront, ĉi tiu triopo «toleris aŭ favoris», notas Ulrich Lins en ESPERANTO EN PERSPEKTIVO, *la floradon de la Majstro-kulto kaj de Esperantismo kun flagoj, steloj kaj verda koloro*.

En 1905 la Unuan Universalan Kongreson partoprenas d-ro L. L. Zamenhof kun nova projekto de «TUTMONDA LIGO ESPERANTISTA», kiun gvidus 25-persona Centra Komitato el kvin fakkomitatoj agada, lingva, kongresa, cenzurista kaj ekzamena. Nu, jam de junio 1890 li estis proponinta regularon pri ia «LIGO INTERNACIA DE ESPERANTISTOJ» kun Akademio el dek personoj; sed rapide li devis ĝin lasi por proponi en januaro 1893 novan organizon de «INTERNACIA LIGO ESPERANTISTA», kies membroj estus la abonantoj al la revuo «LA ESPERANTISTO». Kio montras kiom d-ro L. L. Zamenhof deziris krei unu institucion por Esperanto. Kaj jen la projekto de 1905 timiĝis la francajn gvidantojn ĝuste pro la «idealo», kiun la modesta doktoro jam plurfoje prikantis, des pli ke en tiu jaro 1905 la franca nacio estas profunde dividita ankoraŭ pro la afero de la juda oficiro Dreyfus kaj precipe pro la agado de la Premiero Emile Combes, kiu precize tiam sukcesas voĉdonigi la leĝon pri la apartigo de la religioj kaj ŝtato. Tial el la Zamenhofs projekto restos nur la Lingva Komitato kaj la Kongresa Komitato; dume estos voĉdonita ia protektilo, kiu konsistigas la unuan deklaron pri la neŭtraleco, la fama DEKLARACIO PRI ESPERANTISMO de BULONJO-ĉe-MARO:

1. *La Esperantismo estas penado disvastigi en la tuta mondo la uzadon de lingvo neŭtrale homa, kiu «ne entrudante sin en la internan vivon de la popoloj kaj neniom celante elpuŝi la ekzistantajn lingvojn naciajn», donus al la homoj de malsamaj nacioj la eblon komunikiĝadi inter si, kiu povus servi kiel paciga lingvo de publikaj institucioj en tiuj landoj, kie diversaj nacioj batalas inter si pri la lingvo, kaj en kiu povus esti publikigataj tiuj verkoj, kiuj havas egalan intereson por ĉiuj popoloj. Ĉiu alia ideo aŭ espero, kiun tiu aŭ alia esperantisto ligas kun la Esperantismo, estos lia afero pure privata, por kiu la Esperantismo ne respondas.*

La lasta alineo evidente celis inter aliaj d-ro L. L. Zamenhof mem, kaj sendube tio instigos lin pli poste deklari:

Por tute liberigi la esperantistojn de ĉia suspektelebla solidareco kun miaj privataj politikaj kaj religiaj konvinkoj, mi dum la oka universala kongreso de Esperanto publike formetis de mi ĉian oficialan rolon en la aferoj de Esperanto.

Sed antaŭe tuj de la 2-a Universala Kongreso en Genevo li ekkriis:

El la Deklaracio unuanime akceptita en la Bulonja Kongreso ni ĉiuj scias, kio estas la esperantismo en rilato praktika... (Substreko mia.) Sed krom la flanko praktika, deviga por ĉiuj kaj montrita en la Deklaracio, la esperantismo havas ankoraŭ alian flankon, ne devigan, sed multe pli gravan, flankon idean...

Bedaŭrinde en la lasta tempo inter la esperantistoj aperis tiaj voĉoj, kiuj diras: «Esperanto estas nur lingvo; evitu ligi eĉ tute private la esperantismon kun ia ideo, ĉar alie oni pensos, ke ni ĉiuj havas tiun ideon, kaj ni malplaĉos al diversaj personoj, kiuj ne amas tiun ideon! Ho, kiaj vortoj!... Ho, ne, ne, neniam! Kun energia protesto ni forĵetas tiun ĉi postulon... Kun tia Esperanto, kiu devas servi ekskluzive nur al celoj de komerco kaj praktika utileco, ni volas havi nenion komunan!

Venos iam la tempo, kiam Esperanto, fariĝinte posedaĵo de la tuta homaro, perdos sian karakteron idean; tiam ĝi fariĝos jam nur lingvo, oni jam ne batalados por ĝi, oni nur tirados el ĝi profiton. Sed nun, kiam preskaŭ ĉiuj esperantistoj estas ankoraŭ ne profitantoj, sed nur batalantoj, ni ĉiuj konscias tre bone, ke al laborado por Esperanto instigas nin ne la penso pri praktika utileco, sed nur la penso pri la sankta, granda kaj grava ideo, kiun lingvo internacia en si enhavas.

Verdire la «idea karaktero» ne perdiĝos kun la tempo, sed kompreneble ĝi jam ne rimarkiĝos, kiam la ideo estos fariĝinta familiara por ĉiuj per la uzado mem de la lingvo. Nu, la reago al tia protesto de d-ro L. L. Zamenhof, same kiel al la fama «PREGO SUB VERDA STANDARDO» de la 1-a Universala Kongreso, ne prokrastiĝis; ĝi tuj manifestiĝis per nova **DEKLARACIO PRI LA NEŬTRALECO DE LA KONGRESOJ**, kies «programo ne devas permesi la diskuton de politikaj, religiaj kaj socialaj demandoj».

Sed baldaŭ jen en 1907/08 eksplodis la IDO-KRIZO, pro kiu la movadon forlasis de Beaufront kaj superregis la generalo Sebert kaj la profesoro Cart («Ni fosu nian sulkon!»); kaj 20 % el la gvidantoj transiris al IDO! Ĉe tio la 28-an de aprilo 1908 la 21-jara sviso Hector Hodler fondas individuajn asocion, kies fundamento baziĝas sur la praktikaj ideoj pri «KONSULOJ» de Alphonse Carles. Ja en la fonda statuto de Universala Esperanto-Asocio jam estas artikolo pri la neŭtraleco:

UEA estas neŭtrala rilate al religio, politiko kaj nacieco.

Sed enestas ankaŭ aserto pri la ESPERANTISMO:

La celo de la Asocio estas la plifaciligado de ĉiuspecaj rilatoj inter diverslingvanoj kaj la kreo de fortika ligilo de solidareco inter la membroj.

Per tiu 1-a artikolo, komentas Edmond Privat en sia Historio de la Lingvo Esperanto, la fondintoj volis esprimi sian fidon je la interna ideo de Esperantismo kaj sian kredon, ke la plej bona rimedo por realigi tiun idealon estas kutimigi la homojn sindone servi unu al la aliaj per la lingvo... Esperanto estas natura reago ne nur kontraŭ la materiaj, sed pli vere kontraŭ la spiritaĵoj baroj lingvaj inter la popoloj. En esprima formo ĝi reprezentas ilian sopiron al homara unueco kaj egaleco intergenta...

Guste kion diris d-ro L. L. Zamenhof en Genevo:

Tiu ĉi ideo — vi ĉiuj sentas ĝin tre bone — estas frateco kaj justeco inter ĉiuj popoloj. Tiu ĉi ideo akompanadis Esperanton de la unua momento de ĝia naskiĝo ĝis la nuna tempo.

Kiel konstatas Ulrich Lins en ESPERANTO EN PERSPEKTIVO,

Starante ekster la senmovaj oficialaj institucioj, kiuj siaflanke nur modere aklamis al tiu junula iniciato, UEA diferencigis inter esperantisto laŭ la Bulonja Deklaracio kaj esperantiano, la membro de UEA, kiu en 'Esperantio' vidu modelon de estonta homaro internacie solidara kaj kunlaborema.

Kiel precizigis mem Hector Hodler,

Liveri al la homoj neŭtralan organizaĵon dank'al kiu ili povos plimultiĝi siajn interrilatojn, sin reciproke alservadi, kunigi sian penadon por komuna agado, ĉiam pli kaj pli interkonatiĝi; kreskigi inter ili ĉiam pli profundan senton de solidareco; instrui ilin tiel, ke ili juĝu ne laŭ pure nacia vidpunkto, sed laŭ neŭtrale homa, eksternacia kriterio; fine edukadi la popolamasojn,

ne per propagando, sed per kreado de materialaj, palpeblaj servoj, tiel ke la plej humila homo, kun la tempo, konsciu pri la grava instruo de internaciismo, kiu elŝprucas el tio, jen la tasko de Universala Esperanto-Asocio.

Kaj tial en Barcelono 1909 eĉ d-ro L. L. Zamenhof salutas la novan ascion, kiu

Lasante flanke la instituciojn oficialajn... fariĝis la plej grava institucio de nia movado... UEA unuigas do ne ĉiujn esperantistojn sed ĉiujn esperantistojn, i.e. ĉiujn tiujn homojn, kiuj konsideras ne nur Esperanton en ĝia ekstera lingva formo, sed ankaŭ ĝian internan ideon.

Tiel d-ro L. L. Zamenhof mem nete vidis en UEA la realigon de la projekto, kiun komence li estis proponinta por la Universalaĵ Kongresoj. Ja politika neŭtraleco signifis por li resti sendependa de iu ajn ekstera politika partio, same kiel de iu ajn religia eklezio, sed tio neniel signifis senigi la lingvan movadon je la politikaj konsekvencoj rezultantaj el la ekzisto mem de komuna lingvo por la tuta homaro. Jam en Genevo li ekkriis ankaŭ:

Senkolora oficiala parolado estus granda peko de mia flanko. Mi venas al vi el lando, kie nun multaj milionoj da homoj malfacile batalas pro libereco, pro la plej elementa homa libereco, pro la rajtoj de homo.

Jen la vorto mem estas prononcita de d-ro L. L. Zamenhof: *pro la rajtoj de homo.* (Subtreko mia.) Tiam estis la cara reĝimo: kion li dirus nun? Li estis publikiginta jam en 1901 sian penson sub la titolo HILELISMO kaj ĵus en 1906 la prezenton de la DOGMOJ DE HILELISMO; tio kondukos lin al la publikigo de DEKLARACIO PRI HOMARANISMO en 1913 (en kiu deklaro resonas ja pluraj «rajtoj de homo») kaj — post GENTOJ KAJ LINGVO INTERNACIA en la Kongreso de Rasoj de Londono (1911) — al la fama ALVOKO AL LA DIPLOMATOJ de 1915.

3.^o 1917-1947, la tridekjara neŭtralisma periodo ĝis la nova statuto de UEA. Ĝin karakterizas la degenera iompostioma dissolviĝo de la oficiala neŭtraleco en ian koncepton de negativa neŭtralisma. Al tio certe kontribuis ia reaga sento kontraŭ la socialisma kaj precipe komunisma disvastiĝo de 1917 kaj ankaŭ kontraŭ la apartiĝo de la laboristoj de 1921 en Prago. Kelkaj mejloŝtonoj stampas la regreson.

En 1922 per la fama KONTRAKTO DE HELSINKI la individua asocio UEA alproksimiĝis al la KONSTANTA REPRESENTANTARO de la naciaj societoj, kaj kiel samrajta partio ĝi elektis la komunan Centran Esperanto-Komitaton, poste nomatan INTERNACIA CENTRA KOMITATO por prizorgo de la eksteraj rilatoj. Ŝajne pro la milito la «interna ideo krevis kiel sapveziko» jam ekkriis la sovetiano Demidjuk; kaj pro la klopodoj, eĉ sukcesoj, ĉe la Ligo de Nacioj ICK sentis sin devigata observi ian singardon. Vane Hector Hodler difinis postulojn de la nuntempo: «Nacia libereco, demokratia regado, internacia ŝtatligo», li mortis tro frue en marto 1920 por eviti la degeneron de UEA. En 1923, kiam ĉesas en Parizo la Centra Oficejo de generalo Sebert, de Genevo sonas la lasta protesta voĉo de UEA: Sovet-Unio tiam malpermesas la agadon por UEA, kaj la Estraro de UEA protestas «kontraŭ tiu bolŝevika perfortigo», transdonante «la esprimon de sia varma simpatio al la subpremitaj rusaj samideanoj». Nu en 1924 ICK anstataŭas la Konstantan Kongresan Komitaton, kaj sekve pli ligiĝas per la neŭtralismaĵ deklaroj.

Jam de 1924 la Ligo de Nacioj ne promesis plian frukton: sekvis malfido al internaciismo kaj klopodoj ĉe naciaj registaroj. Ne mirinde do se antaŭ la 21-a Universala Kongreso de Budapeŝto en 1929 estas formulita nova DEKLARACIO PRI NEŬTRALECO:

De kelka tempo malamikoj de Esperanto klopodas por identigi la ĝeneralan propagandon por la internacia helplingvo Esperanto kun la agado de partianoj, kiuj praktike uzas Esperanton por certaj sociaj celadoj.

La Internacia Centra Komitato... deklaras formale kaj firme, ke ĝia programo, celanta nur la enkondukon de Esperanto, estas absolute neŭtrala rilate aferojn de politiko, religio, raso aŭ socio.

Nu en 1932 la asocion UEA minacas bankroto, kaj la Konstanta Reprezentantaro de la naciaj societoj dum kunveno en Parizo nuligas la Kontrakton de Helsinki. Sekvas eĉ propono por UNIVERSALA FEDERACIO ESPERANTISTA, kiu forpelus la supernacian UEA, ĉar la Movado «devas taŭgi por ŝtatoj demokratiaj kaj aŭtokrataj», kaj, kiel diras Ulrich Lins, ĝi devas proklami sian absolutan neŭtralecon respektive indiferentecon en la lukto inter faŝismo kaj demokratio; — unuvorte tion simple fari per la tiel skribita «forlaso de humanecaj ideoj de la 19-a jarcento». Ĉe tio ĉiu rimarkos, kiel revenas la samaj argumentoj nun por forlaso de la Homaj Rajtoj!

La rompo estis evitita en 1933 per la INTERKONSENTO DE KOLONJO, sed je kia prezo! De tiam ia Konsilantaro de la Esperanto-Movado konsistis el komitatanoj de UEA, reprezentantoj de aliĝintaj asocioj, ĉefdelegitoj, honoraj kaj dumvivaj membroj. Fakte UEA estis ensorbata en la influon de la Konstanta Reprezentantaro. Dume en SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA okazis gravaj konfliktoj: post la provoj de SOVET-RESPUBLIKARA ESPERANTISTA UNIO dikti partipolitikan linion al SAT la prezidan-

to de la soveta asocio Drezen estis eksigita kun ok aliaj elstaraj oponentoj; kaj foriris ankaŭ aro da social-demokratoj en INTERNACION DE SOCIALISTAJ ESPERANTISTOJ. Kompreneble tio kontraste plifortigis la neŭtralisman pozicion. Tiam ne estas mirige, se en 1935 neniu voĉo respondis al la vicprezidanto Anton Vogt, membro de la nazia partio, kiam per sia artikolo «NOVA CELO - NOVA SPIRITO» li klarigis sian koncepton per verboj kiel GVIDI, BATALI, ORDONI... Eĉ kiam en 1934, raportas Ulrich Lins, ĉ. dudeko da judaj delegitoj en Germanio jam devis demeti siajn funkciojn en UEA, eĉ kiam en 1936 estis complete nuligita la agado por Esperanto ne nur en Germanio sed ankaŭ en Soveta Unio, la «neŭtrala» movado grandparte silentis! Nur en novembro 1938, rimarkigas Ulrich Lins, post la invado de Ĉeĥoslovakio kaj Aŭstrio oni povis legi en la organo de UEA:

*«For la iluzion!
Resti indiferenta, do neŭtrala malnova koncepto, estus perfidigo de niaj idealoj. Esperanto staras kaj sukcesas nur kun reĝimo respektanta liberecon individuan.»*

Kaj post la militeksplozo la jugoslava revuo LA SUDA STELO deklaris eĉ:

Per neŭtraleco ni intencis utili al Esperanto, sed fakte ni malutilis. Spite nian neŭtralecon malamikoj restis plue malamikoj kaj malpermesis — kie ajn ili povis — nian movadon.

Sed ĉio ĉi estis tro malfrua: jam de la 18-a de septembro 1936 estis fondita la INTERNACIA ESPERANTO-LIGO de la naciaj societoj; UEA estis mortonta, sensignifa, en Genevo, kie ĝi reduktos sian agadon al Esperantista interhelpo dum la milito, kaj la nova IEL kun Centra Oficejo en Londono post 80% - favora ĝenerala voĉdono jam preĝis al la dummilita muteco. Jen al kio estis kondukinta la principo de ABSOLUTA, NEGATIVA, TOTALA NEŬTRALISMO!

4.^o 1947-1974, la dudeksepjara periodo de aktiva neŭtraleco. Kvankam fariĝis banalaĵo la diro, ke iun ajn situacion klarigas la antaŭa, ne facile kaj ne tuj evidentiĝis dezirinda la nova koncepto de pozitiva neŭtraleco. Surbaze de la Interkonsento de Bern (julio 1946) estis subskribita la 28-an de aprilo 1947 — do, tridek naŭ jarojn post la fondiĝo — la Kontrakto de Kunfandiĝo de IEL kaj UEA, kaj tio ĉi faciligis la agadon entreprenitan ĉe la novaj internaciaj organizaĵoj de la Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko.

Unue tamen, kiel skribis la historiisto de la Movado Ulrich Lins, necesis rekonsideri la neŭtralecon de UEA kaj lige kun tio la mondkoncepton de la oficiala Esperanto-Movado. «Tiu ĉi naŭva internaciismo de l' tempo de Zamenhof estas for. Supozeble por ĉiam!» tekstis en Esperanto fine de 1946. Sed kondamnita al morto estis ankaŭ la multe pli naŭva absoluta neŭtralismo de tiuj, kiuj deklaris sin Zamenhofanoj, kvankam ili malofte atingis la pensolarĝon de sia «Majstro».

En la unua postmilita Universala Kongreso, la 32-a, de Bern en 1947 estis prezentita de ok landaj asocioj projekto de rezolucio, kiu kondamnis la sennombrajn naziajn kaj faŝistajn krimojn.

Post «ekscita diskuto», notas Ulrich Lins, la t.n. Berna Rezolucio (propono) estis malakceptita per ĉ. du trionoj de la kongresanoj en la plenskripita salonego — kaj la venkintoj ekstaris por kanti la Himnon. Tamen la baza ideo de la Berna rezolucio — ke UEA ne povas indiferente rilati al la ĝenerala evoluo de la internacia socia kaj politika vivo; ke apliki la principon de neŭtraleco eĉ rilate la persekutantojn de Esperanto signifus memdetruon; ke la Asocio povos atingi siajn celojn nur sub la kondiĉoj de paca kunlaboro inter la popoloj kaj de socia egaleco — reliefigis dum la postaj jaroj kiel kerno de la principaro de UEA.

Tial d-ro Ivo Lapenna, kiu estis enirinta jam de 1938 en la Estraron de IEL, proponis al la Komitato de UEA dum la Kongreso mem de Bern novan formulon de la principo de neŭtraleco favore al la respekto de la Homaj Rajtoj. Ni memoru, ke en 1906 en Genevo d-ro L. L. Zamenhof mem jam aludis pri «la rajtoj de homo». En la 4-an artikolon de la nova statuto de UEA (definitive akceptita en aŭgusto 1948) estis donita la dua alineo: UEA deklaras, ke la respekto de la homrajtoj estas por ĝia laboro esenca kondiĉo». Kaj tiu aldono, kiu altigis la pozicion kaj kontribuis al la prestiĝo de UEA en ĉiuj almenaŭ demokratiaj medioj, efektiviĝis ja pli ol unu jaron antaŭ ol la 10-an de decembro 1948 estis akceptita de preskaŭ ĉiuj ŝtatoj en la mondo la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj. KAJ TIAM NENIU LEVIS VOĈON KONTRAŬ LA HOMRAJTOJ! Tiel ke en la Universala Kongreso de Parizo en 1950 d-ro Ivo Lapenna povis ja deklari:

Inter la esperantistoj la respekto de la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj ne estas bela propaganda frazo sed realaĵo, fundamenta gvidprincipo de la tuta agado, esence, je vivo kaj morto, ligita al la ideo mem de la Internacia Lingvo.

Post decembro 1954 sekvis kunlaborado kun Unesko, kaj ĝuste dank'al tiu koncepto de pozitiva neŭtraleco — male al tio kio okazis kun la Ligo de Nacioj — UEA povis

aktive subteni plurajn celojn de Unesko. En 1956 prof. d-ro Ivo Lapenna substrekis:

La Internacia Lingvo estas esence, laŭ la naturo mem de la afero, ligita al difinitaj ideoj. Sajnas al mi, ke mi ne eraras, se mi diras, ke tiuj bazaj ideoj estas:

Unue, egaleco de ĉiuj rasoj kaj nacioj, do neta kaj senkompromisa kontraŭrasismo; due, tuthoma solidareco kaj respekto de la homaj rajtoj, formultaj nun tute klare en la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj; trie, libereco, ĉar nur en plena libereco esprimiĝas kaj floras la egaleco, kaj fortiĝas la solidareco.

Per artikoloj, informoj, memorigoj de datrevenoj UEA aktive partoprenis en multaj kampanjoj de Unesko. En 1958 estis la dekjara datreveno de la Universala Deklaracio, kiun datrevenon preskaŭ ĉiuj Esperanto-grupoj kuncelebris. Tiel ke en la Universala Kongreso de Bruselo en 1960 prof. d-ro Ivo Lapenna povis rimarkigi:

Komprenoble oni povas kunekzisti diversmaniere. Ankaŭ sovaĝaj bestoj ekzemple kunekzistas unuj apud la aliaj en ŝtalaj kaĝoj de zoologiaj ĝardenoj. Sed ni esperantistoj opinias, ke la mondo ne estas zoologia ĝardeno; ni fidas, ke la homoj ne estas sovaĝaj bestoj kaj tial ni preferas internacian kunlaboradon de la homoj en frateco kaj libereco, ol la nuran kunekzistadon en la kaĝoj de politikaj limoj kaj lingvaj baroj.

En 1963 same estis memorigita la dekkvinjara datreveno de la Universala Deklaracio, kaj en la Universala Kongreso de 1964 precizigita iu nocio de paco:

Ankaŭ arestitoj kaj kondamnitoj en karceroj estas tenataj en paco! Ni ne estas por tia paco. Ni estas por paco en libereco, en kiu la homaj rajtoj estas observataj, ĉar nur tia paco respondas al la homa digno kaj nur tia paco garantias personan feliĉon, materian prosperon kaj intelektan progreson.

Poste venis la Jaro de Internacia Kunlaboro en 1965, la Jaro de Homaj Rajtoj en 1968, la Internacia Jaro de Edukado en 1970, la Internacia Jaro de la Libro en 1972... Per la literatura serio Oriento-Okcidento UEA kontribuis al la ĉefprojekto pri Reciproka Apezado de Orientaj kaj Okcidentaj Kulturaj Valoroj. Kaj tiel plu... Cio ĉi estis ebla nur dank'al la nova koncepto de aktiva, pozitiva neŭtraleco kiel precizigita de d-ro Ivo Lapenna en sia inaŭgura parolado por la Universala Kongreso en Sorbono de 1950:

UEA estas neŭtrala. Ĝi troviĝas ekster kaj super la politikaj luktoj, sed en ĝiaj fundamentoj troviĝas la principo de la respekto al homaj rajtoj kaj liberecoj. Tio signifas, ke ĝi — celante disvastigi la Internacian Lingvon kune kun ĝia nedisigebla apartenaĵo: la spirita proksimiĝo de la homoj — ebligas al ĉiuj siaj membroj konservi siajn proprajn mondrigardojn kaj konvinkojn, libere esprimi siajn opiniojn.

La neŭtraleco ne signifas, do, senideecon aŭ unuformigon de la penso. Male, ĝi estas konvena grundo por kresko kaj florado interne de la Movado de ĉiaspecaj pensoj kaj ideoj — krom tiuj, kiuj evidente kontraŭas al la esenco mem de la Internacia Lingvo kaj de ĝia signifo...

Le neŭtraleco, plue, signifas, ke en eksteraj rilatoj ni ligas nin al neniu politika koncepto, al neniu alia movado, al neniu fremda ideologio. Kiel esperantistoj ni estas memstaraj kaj sendependaj, kaj ni iras nian propran vojon...

* * *

Tiel sume tre longa estis la vojo trairita de 1887 ĝis 1947 por atingi taŭgan formulon de la NEŬTRALE HOMA KARAKTERO de la lingvo kaj movado, ja ekde la tiel tro malprecize nomata «interna ideo» ĝis la vortigo de «humaneca internaciismo».

Post la dekjara ŝtupo unua sen problemoj pri neŭtraleco — post la dudekjara dua ŝtupo, kiu konflikte kun d-ro L. L. Zamenhof oficiale forpelis la «esperantismojn» en la vicajn de la komenciĝanta UEA — post la tridekjara tria ŝtupo, kiu preskaŭ sukcesis sufoki ĉian penson per apliko de plej absoluta neŭtralismo — fine en la kvara ŝtupo per observo de la Homaj Rajtoj plentate esprimiĝis la plimulto el la idearo de HUMANECA INTERNACIISMO, kiu rezultas el la uzado mem de komuna lingvo por la tuta homaro.

La neŭtraleco de UEA en la jaro de la fondiĝo 1908 estis jene vortigita:

Art. 4: «UEA estas neŭtrala rilate al religio, politiko kaj nacipeco».

Post la Interkonsento de Kolonjo de la 4. aŭgusto 1933 ĝi fariĝis:

«UEA estas neŭtrala rilate al religio, nacipeco, politiko kaj sociaj demandoj; en ĝia viroj kaj virinoj estas egalrajtaj kaj elekteleblaj al ĉiuj oficoj.»

Kiel komentas prof. d-ro Ivo Lapenna,

Identan formulon enhavis Art. 4 de la Statuto de Internacia Esperanto-Ligo de 1936, reviziita en julio 1940. Ĝi restis senŝanĝa ĝis 1947, resp. ĝis 1948 en la Statuto de la Asocio. La aldono pri egalrajteco de viroj kaj virinoj fakte havis nenian signifon, ĉar ankaŭ pli frue tiu principo estis rekonita kaj ĉiam respektata. Eble ĝi estis intence metita en la Statuton por iel kaŝi aŭ ekvilibri la multe pli signifan aldonon pri neŭtraleco rilate sociajn demandojn.

Kaj fine post la Universala Kongreso de Bern en 1947:

«UEA deklaras, ke la respekto de la homrajtoj estas por ĝia laboro esenca kondiĉo. Ĝia sinteno estas diktata de la ideaj celoj de la Esperanto-Movado. Ĝi rilatas simpatie al ĉiuj movadoj, kiuj sur ne politika bazo klopodas efektiviĝi ideojn identajn tute aŭ parte kun la celoj de la Asocio. (Substreko mia.)

La nova formulo estis treege grava, ĉar la Universala Deklaracio, proklamita nur unu jaron kaj duonon pli poste, rekonas multajn rajtojn (aparte kulturajn kaj lingvajn) kaj fundamentajn liberecojn egale validajn «por ĉiuj homoj sen kia ajn diferencigo, laŭ raso, haŭtkoloro, sekso, lingvo, religio, politika aŭ alia opinio, nacia aŭ socia deveno, posedaĵo, naskiĝo aŭ alia stato». Kio plene respondas al la koncepto de la tradicie nomata «interna ideo» sed pli klare esprimita «humaneca internaciismo».

P.S. — Verfakte ne la tuta antaŭmilita neŭtrala movado restis «pasive neŭtrala» antaŭ la faŝisma totaleca progreso de nacisocialismo (HORIZONTO, V, 26, p. 23). Jam dekomence en «SUDA STELO» aperis artikoloj energie kontraŭ nazismo-faŝismo kaj «kontraŭ la kliniĝo de la gvidantoj de la Esperanto-Movado en la faŝismaj landoj kaj (ekde 1937 en Zagreb) kontraŭ la pasiveco de UEA kaj IEL antaŭ faŝismo».

(daŭrigota)

(Pri la nuna stato de la posthamburga periodo)

VI-a INTERNACIA KONFERENCO DE LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO

Strasburgo, Francujo, 26/7 ĝis 1/8/1980

Konstanta adreso: S-ino M. Muller, 80, Bd. Clémenceau, F 67000 Strasburgo

Poŝtĉekkonto: 673 93 N, Strasbourg

I N F O R M O J

Konferencejo

Ĝi estas; «Foyer du feune ouvrier chrétien», 6, rue de Bitche, en la norda parto de Strasburgo.

Loĝado

Por la restado en la Konferencejo validas la jeno:

Loĝado estas rezervenda por la tuta konferenca periodo.

Por unu persono la prezoj estas jenaj:

650 F.F. en 1-lita ĉambro

550 F.F. en 2-lita ĉambro

520 F.F. en 3-lita ĉambro

Tiuj prezoj inkluzivas la jenon: lito, ĉiuj manĝoj ekde la vespermanĝo sabaton la 26-an de julio ĝis la tagmanĝo la 1-an de aŭgusto (kun escepto de la vespermanĝo dimanĉon) ĉiuj servmonoj, litotukoj kaj impostoj. Tualettukojn oni bonvolu mem kunporti.

Oni bone notu ke la nombro de unulitaj ĉambroj estas tre limigita.

Malmendoj de loĝado en la Konferencejo kun repago de la tuta pagita sumo minus 100 F.F. povos okazi ĝis la 15-a de junio 1980.

Akceptejo

Sabaton la 26-an de julio la akceptejo ekfunkcios je la 10h30.

Provizora programo

La du ĉeftemoj de la Konferenco estas:

«Lingvodiverseco kiel obstaklo al kreo de eŭropa konscio» kaj «La stato de la Esperanto-Movado en 1980 kaj la rolo de N.E.M.».

Ekskursoj

Vizito per aŭtobuso al la vidindaĵoj de Strasburgo kun klarigoj en Esperanto (Eksk. A) 25,00 F.F.

Tuttaga aŭtobusa ekskurso al la belega regiono de Altaj Vogezoj inkl. de tagmanĝo en tiea restoracio kaj malpeza vespermanĝo en tipa vilaĝo apude de Strasburgo (Eksk. B) 130,00 F.F.

Bankedo ĝi okazos en restoracio sur la bordo de la rivero Rejno kun bela panoramo super ĝi kaj parko apude 75,00 F.F.

Kiu ne havas Aliĝilon rapide petu ĝin de la konstanta adreso!

M. Muller

Prez. de la Loka Organiza Komitato

KIO ESTAS KAJ KION CELAS N. E. M.?

(Laŭ teksto komisiita de la 5-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado)

- 1. NEGATIVAJ SEKVOJ DE HAMBURGO.** — Kiel pruviĝe en la verko *Hamburgo en Retrospektivo* kaj en *Horizonto*, la hamburgaj eventoj de 1974, esence inspiritaj de eks-termovadaj politikaj fortoj, kaŭzis, ke la gvidantaro de UEA venis sub daŭre kreskantan premon de partipolitikaj Esperanto-instancoj, agantaj en UEA laŭ la ĝeneralaj direktivoj aŭ rektaj instrukcioj de *partipolitikaj faktoroj ekster la Esperanto-Movado*. Tio perdis al UEA la neŭtralecon, kion ankaŭ formale konfirmas la nova Statuto de la Asocio, kaj la sendependecon, do la du esencajn antaŭkondiĉojn por efika agado en ĉiuj sociaj medioj. Ĝi kaŭzis gravan politikan kompromitiĝon de la Asocio kaj interne malfortigis ĝin sur ĉiuj linioj. Interalie, ĝin forlasis unu kvinono de la individuaj membroj.
- 2. KIAL N.E.M.?** — La politika kompromitiĝo de UEA pro la partipolitikaj agadoj de granda parto de ĝiaj «landaj asocioj» (fakte partipolitikaj organizaĵoj aŭ instancoj) kaj de iliaj komitatanoj en UEA, kaj pro la pasiveco de la alia parto rilate tiujn aktivaĵojn, necesigis la esprimiĝon de la neŭtrala zamenhofa esperantismo pere de la Neŭtrala Esperanto-Movado. Ne estas, do, N.E.M., kiu kaŭzis la nunan profundan krizon, sed, male, la profunda krizo kaŭzita de la hamburgaj eventoj necesigis la idean daŭrigon de la antaŭhamburga UEA pere de N.E.M.
- 3. KIO ESTAS N.E.M.?** — N.E.M. ne estas organizaĵo. Ĝi ne havas membrojn. Ĝi konsistas el ĉiuj Esperanto-parolantoj, kiuj — ĉu en UEA mem, ĉu ekster ĝi — apogas la principon de aktiva neŭtraleco, kiel difinita en la antaŭa Statuto de UEA kaj kiel observata ĝis la *Universala Kongreso en Hamburgo*. La plej grava periodaĵo de N.E.M. estas *Horizonto*, kaj la ĉefaj publikaj manifestigoj de N.E.M. estas ĝiaj Internaciaj Konferencoj. N.E.M. jam plenumis pozitivan rolon: ĝi malhelpis aŭ almenaŭ iom malrapidigis eĉ pli fatalajn erarojn de la posthamburgaj gvidantaroj de UEA, unuflanke, kaj montris al la ekstera mondo, ke la partipolitike neŭtrala Esperanto-Movado plu ekzistas, aliflanke.
- 4. N.E.M. KAJ U.E.A.** — Kontraŭe al tio, kion difinitaj rondoj misinforme diskonigas tra la Esperanto-Movado, N.E.M. estas nek kontraŭkomunisma, nek kontraŭkapitalisma, nek kontraŭ kiu ajn alia politika aŭ doktrina ismo, sed ĝi ja pozitive rilatas al la respekto de la homaj rajtoj, precipe la rajtoj je liberaj organiziĝo, esprimiĝo kaj komunikado. N.E.M. konsistas el apartenantoj de diversaj religioj kaj politikaj partioj, inkluzive diverstendencajn socialismajn kaj komunismajn, sed ĉiuj kunligitaj per la deziro progresigi Esperanton kiel lingvan esprimon de tuthomeco kaj internacia kunlaboro en paco kaj libereco. Tute alia afero estas akcepti partipolitikajn Esperanto-instancojn kiel aliĝintajn asociojn kun multnombraj membroj en la supera organo, la Komitato de UEA. Tio — ne tiu aŭ alia politika konvinko de unuopuloj agantaj libere laŭ siaj konsciencoj — kaŭzis la unudirektan politikigon de la Asocio kaj la perdon de ĝia sendependececo. N.E.M. batalas kaj plu batalos kontraŭ la subigon de UEA al difinita bloko, same kiel ĝi batalus kontraŭ la subigon de UEA al kiu ajn alia politika partio aŭ bloko.
- 5. ALVOKO.** — N.E.M. fariĝos superflua, kaj ĉiuj ĝiaj apogantoj donos plej fortan subtenon al UEA, kiam UEA revenos al la tradicia vojo de partipolitika neŭtraleco, hodiaŭ pli aktuala ol iam antaŭe, konforme al sia antaŭa Statuto. Nur tio ebligos vere efikan agadon por la Internacia Lingvo en la nunaj escepte favoraj eksteraj cirkonstancoj. N.E.M. alvokas ĉiujn sincerajn esperantistojn, inkluzive funkciulojn de UEA, konsciiĝi pri la graveco de la krizo kaj helpi, interalie per abonado kaj diskonigo de *Horizonto*, ke UEA retrovu sin mem kiel eble plej baldaŭ en la intereso de la Asocio kaj, multe pli grave, de Esperanto. Intertempe N.E.M. plu klopodos disvastigadi Esperanton kaj tiujn ideojn de humaneco, kiuj estas nedisigeble litigitaj al ĝi.

Horizonto, la laŭtparolilo de partipolitika neŭtraleco en la Esperanto-Movado, sendependa sentinelo de ties principoj, ĉiam aktuala kun daŭra historia valoro.

Se vi konscias, ke la internacia neŭtrala Esperanto-Movado devas esprimiĝi, helpu al *Horizonto* per diskonigo de ĝia enhavo, abonado, kaj instigo al legado.